

## Kiel Tibor Sekelj raportas pri sia efika advokatado poresperanta ĉe Unesko

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1986

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-164/Radiokasedo-164-5-86-A-1021-Claude-kaj-Andree-GACOND-Kiel-Tibor-Sekelj-raportas-pri-sia-efika-advokatado-poresperanta-che-Unesko.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

En esperantujo iom post iom diskoniĝas la fakto ke Unesko akceptis novan rezolucion favore al Esperanto. La revuo Esperanto de UEA tre detale raportis pri ĝi en sia numero decembro 1985. La advokato de Esperanto, ĉe la 23-a Ĝenerala Konferenco de Unesko, kiu kunsidis en Sofio en oktobro pasintjara, estis Tibor Sekelj. Ni legos al vi hodiaŭ parton el lia raporto, kiu estas vivoplena kaj kiu bone montras ke ne iu ajn povas advokati favore al kaŭzo. Ni do citas Tibor Sekelj:

A.- «...kaj mi komencis mian kampanjon. Mi alparolis delegitojn en la ĉefa salono de la konferencujo, kie tabulo montris klare ilian landan apartenon. Aliajn mi alparolis en la koridoro aŭ en la manĝejo, elektante laŭeble la landojn, ĉe kiuj mi povus havi ŝancojn. Kelkaj ne montris grandan komprenemon. Aliaj eksimpatiiis kun Esperanto, eĉ kun la rezolucia propozicio. Sed subskribi ĝin alpreni respondecon pri io ne tre konata aŭ utila por la koncerna ŝtato. Iuj devis konsultiĝi kun la tuta delegitaro de sia lando. La Afrikaj ŝtatoj subskribas ion nur laŭ kolektiva decido, kaj tiaj kunvenoj okazos nur post kelkaj tagoj, kio prokrastus la transdonon.

Cl.- Fine la Jugoslava delegitaro akceptis prezenti la proponon je sia propra nomo kondiĉe ke pliaj subskriboj estu poste aldonitaj. La rezoluci-propono do aperis oficiale, kiel propono de Jugoslavio, la 15-an de oktobro kaj dum la sekvaj kelkaj tagoj aldoniĝis la subskriboj de Bulgario, Ĉinio, Hungario, Kostariko, Pollando kaj Sanmarino. Tio estas publikigita en la konferenca ĵurnalo de la 22-a de oktobro.

A.- La rezoluci-propono aperis tute juste en la granda programo 11, kiu titoliĝas 'La kulturo kaj la estonteco'. Tamen, en la subprogramo, kiu temis pri inventarado, kolekto kaj pristudo de nefizika kultura heredaĵo. Tiun lokon mi trovis ne la ĝusta kaj postulis ke oni transloku nian temon al la subprogramo, kies temo estis internacia kultura kunlaboro, kaj en tio mi sukcesis. Mi postulis ankaŭ, ke al la rezoluci-propono oni aldonu paragrafon ĉe la fino, kie oni rekomendu al la Ĝenerala Direktoro envicigi la jubileon de Esperanto inter la jubileoj por 1987, ĉar mi intertempe malkovris ke tia propono tamen tute ne estis farita. En tio mi ne sukcesis ĉar montriĝis ke por tion atingi necesus nuligi la rezoluci-proponon, denove peti la subskribojn kaj la opinion de la Ĝenerala Direktoro, kaj tiu proceduro povus malfruigi la tutan aferon.

Cl.- Intertempe mi petis la parolrajton en la Pleno kaj faris 12-minutan paroladon en la angla lingvo, prezentante ĉefe la nunajn staton kaj atingojn de la Esperanto-movado. Bedaŭrinde, tio okazis malfrue posttagmeze kaj multaj delegitoj jam foriris. Tamen, la sekvan tagon la parolado aperis presita en la angla kaj multaj povis ĝin legi. Post la parolado pluraj venis al mi por peti pliajn detalojn pri Esperanto. Post du tagoj la Aŭstralia reprezentanto haltigis min en la koridoro: 'Mi aŭdis, ke via parolado estis tre interesa. Ĉu vi eble havas ĝian kopion?' - Kompreneble mi havis ĉemane presitan ekzempleron.

A.- Kiam la kvara komisiono ekfunkciis, mi tuj okupis mian lokon tie kaj komencis mian kontaktadon uzante ĉiujn lingvojn, kiujn mi konas, escepte de Esperanto. Al la brazilano mi parolis pri miaj vojaĝoj tra ĝangalo kaj pri nia grava Universala Kongreso tie en 1981. Al la argentinano pri grimpadaj al Akonkagvo kaj poste kompreneble pri Esperanto kaj la rezoluci-propono. Al la Urugvaja delegitino mi memorigis ke en ŝia lando estis aprobita la unua rezolucio de Unesko favore al Esperanto en 1954. Al la meksikano, ke estis lia delegito, kies propono estis tiam akceptita. Al la ĉina delegito mi donacis mian libron Kumeŭaŭa en la ĉina, kiun li la sekvan nokton tralegis. Al la japana mi menciis la eksterordinaran sukceson de tiu libro en lia lando. Al la afrikaj reprezentantoj mi parolis pri la bezono de komuna lingvo por la afrikaj popoloj kaj mi abunde distribuis mian broŝuron : ‘Esperanto, komuna lingvo por Afriko, komuna lingvo por la mondo’, UEA, 1962. Kaj multajn esperanto-dokumentojn de UEA pri la lingvo-problemo. Pluraj el ili unufoje renkontiĝis kun Esperanto kaj ili estis profunde impresitaj. Kun multaj mi amikiĝis. Estis inter ili edukministroj kaj aliaj respondecaj funkciuloj. La delegito de Benino informis min, ke venontjare grupo de lingvoprofesoroj okazigos kunvenon pri lingvaj problemoj de Afriko, kaj ke ili nepre invitos min partopreni tiun kunvenon kaj klarigi ĉion pri tiu Esperanto.

Cl.- Fine alvenis la diskuto pri la ĉapitro, en kiu troviĝis nia rezoluci-propono. La ĉeftemo estis la starigo de jardeko de kultura evoluo, kiu devus komenciĝi en 1988. Kaj ĝi estis la centro de la atento por la plimulto de la parolantoj. Ankaŭ mi petis la vorton kaj je la nomo de UEA promesis plenan apogon al tiu projekto, precipe sur la kampo de kultura interŝanĝo, ĉar tion ni efektive faras jam 98 jarojn. Kaj mi daŭrigis informi pri Esperanto, pri UEA, ĝiaj eldonoj, esperanto-literaturo, multaj internaciaj kunvenoj, neŭtraleco kaj tiel plu.

A.- Dum siaj paroladoj tri reprezentantoj menciis nian rezoluci-proponon. La Jugoslava delegito tute mallonge pledis por ĝia aprobo. La japana reprezentanto faris tion iom pli emfaze, evidente interesita. Fine, la delegito el Ebura Bordo post antaŭe longa interparolo kun mi diris ke lia registaro bonvenigas la organizon de la Universala Kongreso de Esperanto en lia lando en 1990. Kaj ke li esperas, ke tiu evento estos signifoplena por la akcepto de Esperanto.

Cl.- Fine la prezidanto de la komisiono, s-ro Dumont, delegito el Belgio, komencis voĉdonigi la diversajn rezoluciojn. Iuj estis aprobitaj, aliaj diskutataj aŭ prokrastitaj. Kiam li proksimiĝis al nia numero en mia ia obtuza voĉo ripetis la vortojn de Zamenhof : ‘Ho mia kor’ ne batu maltrankvile, ĉu ni ne venkos en decida hor’ ?’ Subite s-ro Dumont diris :

A.- ‘Sekvas d.r. 218. Kiel vi scias, temas pri la rekono de la meritoj de Esperanto kaj de ĝia centjariĝo. Ni aŭdis la elokventajn informojn de la ĝenerala sekretario de la Esperantomovado kaj mi supozas, ke ni ĉiuj estas konvinkitaj pri ĝiaj meritoj. Ĉu iu havas rimarkon?’

Cl.- Post kvar sekunda plena silento li martelbatis la tablon kaj diris: ‘Do, akceptita’.

A.- En tiu momento ne gravis ke mia koro vere forte batis, kaj ne gravis la mistitolo ‘ĝenerala sekretario’. Gravis la fakto ke nia rezolucio estis ĉiuvoĉe akceptita. »

Cl.- La venontan semajnon ni citos la tekston mem de tiu rezolucio kaj analizos ĝian signifon. Hodiaŭ ni volis danki al Tibor Sekelj pro la talenta maniero per kiu li advokatis nian kaŭzon.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis la venonta ĵaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*